

G. M.

Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

21 (1 / 1998) LEA/G

MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio per germanlingvaj regionoj
 Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete

La MAGAZINO kun nova formato

Ke la *Magazino* dum la pasintaj numeroj poiome alivestiĝas per renovigita formato, verŝajne rimarkis la plimulto de legantoj. Ni esperas, ke ili perceptas fronte al tiuj aliigoj de la eksteraĵo ne nur ŝanĝon, sed ankaŭ plibonigon. Ke ĉi-foje denove io ŝanĝiĝis, certe neniu preterrimarkos: La formato duoniĝis de A4 al A5. Kompense, la paĝnombro duobliĝis de 12 al 24. La amplekso do restis sama.

Tiu ĉi formato ebligas, kiel ni esperas, pli facile manipuli la gazeton kaj eventuale enarkivigi ĝin (kun multaj aliaj samdimensiaj periodaĵoj). Ĝi ebligas pli uzanto-afablan, malpli plumpetan bindadon (pro alia maniero krampi), dum ĝi aliflanke ebligas plue uzi la *paperformaton* A4, kio tre gravas pro kostoj. La ŝanĝo tamen bedaŭrinde ne influas la pagendan afrankon.

Eble indas priskribi ĉi-loke la konsiston de la redakcio kaj la aktualan labormanieron. Mi jam pasintjare transprenis grandan nombron de redakciaj taskoj, kiujn antaŭe plenumis Albert Stephan. Sed ne ĉiujn, kaj kvankam

Albert flate karakterizis min kiel «ĉefredaktoron», mi tamen esperas, ke la redakcio restos kolektiva respondeco de li. Hans Rodewig kaj mi, ne hierarkie strukturita kaj nepre alirebla kaj konkrete asistata de legantoj.

Nun la laboro okazas tiel, ke mi kunmetas la *Magazinon* el materialo ricevata de kontribuantoj. Multon, kion mi bezonas ĉe la redakta laboro – ankaŭ gazetojn de aliaj LEA-oj kaj kun SAT ligitaj asocioj – Albert Stephan sendas al mi. Mi kompostas la *Magazinon* komputile, uzante Word for Windows 6.0 kaj inkŝprucan printilon, sed ankaŭ uzante kiom eble la simplan teknikon de tondado kaj gluado, kaj «presas» ĝin per fotokopiilo en la plej malmultekosta fotokopiejo, kiun ni sukcesis trovi, kiu feliĉe situas iom proksime de mia hejmo en Wedding. (La malmultaj paŝoj de la aŭtobushaltejo en Wedding ĝis la butiko en Prenzlauer Berg kondukas preter la loko, kie la tiama murego – intertempe revolucie forbalaita – kurbiĝis ortangule kaj estis iutempe sur la flanko de Wedding dekoraciita per ŝprucpentrira pordo

kaj la ironiaĵo «Kiu trapasos ĉi tie. ricevos de mi markon.») Ekde ĉi tiu numero, ni, t.e. mi, kaj kelkaj aliaj anoj de la berlina *Maldekstra Forumo* kunmetos la foliojn kaj krampos la *Magazinojn* per la tre konvena oblikva krampilo en la GEJ-oficejo, kiu pro plia bonŝanca hazardo situas ankaŭ en Prenzlauer Berg, anstataŭ kiel ĝis nun simple sendi la tuton al Oberkirch. La pretajn *Magazinojn* ni tamen sendos almenaŭ ĉi-foje al Oberkirch por ekspedo fare de Albert Stephan, kvankam ni priparolis la eventualan eblon fari tion rekte de Berlino.

Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:
Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj (LEA/G)/ Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEA/G)
Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch,
(Tel.+Fax: (07802) 90 336)
LEA/G per SAT en TTT:
<http://www.worldnet.net/~sat-esp/>

Redakcio / Redaktion:
Gary Mickle (G.M.), Brüsseler Str. 6,
DE-13353 Berlin. (Tel.: (030) 453 96 47)
Hans Rodewig (H.R.), Stammestr. 86D,
DE-30459 Hannover
Albert Stephan (AFS), adreso de LEA/G
supre indikita / oben angegebene Adresse
von LEA/G

Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi alsendaĵojn.

MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint vier Mal jährlich;

abonprezo / Bezugspreis 15,- DM

La membrokotizo entenas liveradon de la bulteno.

LEA/G-konto: Sonderkonto Kersting
n-ro 416 210-432 Postbank Essen
(BLZ 360 100 43)

En ĉi tiu loko mi volas peti la indulgon, resp. pardonon de la legantoj ne pri unu, sed tri aferoj:

- Mi petas indulgi la sinsekvon de grafikaj kaj tipografiaj ŝanĝiĝoj, kiu sin

trenas tra multaj numeroj. Kompreneble, estus pli profesiece enkonduki ĉiujn novigojn samtempe kaj poste teni aspekton kontinuecon dum iom longa tempo, sed, ne estante profesulo, mi lernas dumlabore, kaj ne volus ekskludi pliajn (tamen malgrandajn) grafikajn modifojn en estontaj numeroj.

- La folioj de *Magazino* n-ro 20 (la lasta) grizetiĝis dum la fotokopiado, ĉar mi uzis la malhelan el la tri disponeblaj ŝtupoj de kopia heleco. Tion mi faris ne erare, sed por eviti la trohelecon, kiu aperis en la antaŭa numero, kiam mi uzis la mezan ŝtupon. Mi esperas solvi tiun problemon ĉinumere per alia laborprocedo.
- Fine, bonvolu pardoni la malfruigon de ĉi tiu numero. Bedaŭrinde, mi devis flankonmeti la redakcian laboron dum longa tempo en decembro kaj komence de januaro pro (pagata) kromlaboro, kiun mi faras de tempo al tempo kaj kiu utilas al mi pro la kurtigita laboro kaj sekva salajro-redukto en la fabriko, kie mi havas mian ĉefan laboron. Ĉe tiu kromlaboro mi ne povas influi la tempon, kiam ĝi venas.

Tiu laboro, cetero, konsistis el korektado de anglalingvaj sociologiaj-ekonomikaj tekstoj verkitaĵoj de neanglalingvaj sciencistoj el diversaj (ĉefe orient-eŭropaj) landoj por eldonota libro. Tio ne rilatas rekte al Esperanto, kompreneble, sed dum la okupiĝo pri tiaj tekstoj mi ne povis ne pensi foje pri la relativa funkciivo de la angla kaj Esperanto kiel (efektive aplikataj) lingvoj de internacia komunikado. Se mi volus ĉi tie nutri la esperantistan memfidon de la legantoj, mi povus mueli la konatajn eldirojn pri la terura ortografio de la angla, la malfacilaj idiomaĵoj ktp., kiuj estas faktoj,

kiujn la dumlabore trovitaj korektendaĵoj efektive atestis. Sed tio, kio eĉ pli frapis min, kaj kio taŭgas pli por ŝrumpigi la esperanistan malhumilecon: la lingvaj difektoj de la anglalingvaj tekstoj estis neniel pli grandaj ol tiuj, al kiuj ni tiel *kutimiĝis* en multaj presitaj kaj manuskriptaj Esperantaj tekstoj, ke ni ofte apenaŭ plu rimarkas ilin, kaj la unuece aplikata faka terminologio en ili prezentas ion, pri kio oni povas ofte nur revii en Esperanto, kies vortaroj ofte aĝas jardekojn kaj maldikas. Mi ne dubas, ke plenumi kompareblan laboron en Esper-

anto *eblus* (se oni havus tiom da sciencistoj sciantaj la lingvon), sed nur se oni enplanus aldonan fazon de interakordiĝo pri la aplikenda terminologio.

Iam Gregor Gysi preterpasis Esperanto-standon en Berlino kaj demandis al deĵoranto, kiel nomiĝas *Scheuerlappen* en Esperanto. Kiam tiu ne sciis tuj respondi, li konkludis: «Estas ankoraŭ multo por fari!» Ĉiam denove ni devas konstati, ke vere tiel statas.

GM

La politikeco en LEA/G

Kamarado F. Bues opinias [en *Magazino* 20 (red.)], ke «subteninda» estas «germanlingva bulteno», kiu «estu(s) direktita al ne esperantista publiko kun bezono je tre bazaj informoj pri la lingvo mem, ĝia aplikado, ĝia komunumo kaj...» – jes, ĉi tie F. Bues ekhaltas. Li esprimas sin kontraŭ la opinio de Gary Mickle, ke informa bulteno de la Libera Esperanto-Asocio aperigu informojn «tute aparte pri ĝia [t.e. de E-o] laŭ mi [t.e. G.M.] ne bagatela loko en la sortimento de maldekstraj (aŭ progresivaj) strebadoj». Li esprimas sin do kontraŭ tio, ke la politika Esperanto-asocio publike diskonigu siajn politikajn strebadojn: «Tio ... povus eĉ havi la tute kontraŭan efikon.»

Sed kio do eniru tiun bultenon? En kio konsistas do laŭ F. Bues la valoro de Esperanto? Kio do laŭ lia vidpunkto pravigas la ekziston de sendependa Esperanto-asocio apud GEA? Kian reklamon faru politika Esperanto-asocio, se ne politikan?

Politikaj diskutoj okazas hodiaŭ ankaŭ en GEA. Implicite politika-progres-

iva baza teniĝo estas nuntempe memkomprenebla ĉe la plimulto de GEJ-anoj. Aparteco disde GEA laŭ mia opinio pravigeblas nur, se LEA/G havas principie alian vidpunkton pri la socia kaj politika roloj de Esperanto. Se ne ekzistas tiuj principaj diferencoj, oni farus pli grandan servon al la afero de Esperanto per unuigo de la fortoj, t.e. per aliĝo al GEA kaj subtenado de GEA per ĉiuj fortoj. Kio estas la ekstrajo, kiun LEA/G alie ol GEA proponas, se ne la politika pretendo de LEA/G? Kaj ĝuste tiun politikan pretendon la Asocio sekretigu?

Kio postrestus ja de varbilo de LEA/G, se oni forstrekus el ĝi ĉion politikan kaj socian? Nura neŭtralajo. Simpla imitaĵo, malbona kopio de GEA.

Mi do sekve petas F. Bues, ke li klarigu *siajn* kialojn, pro kiuj li membras en LEA/G. En kio konsistas por vi la valoro de la Libera Esperanto-Asocio, kontraste kun GEA?

Pri la lingvoj uzendaj en eldonaĵoj de la Libera Esperanto-Asocio: mi neniel kontraŭas fojfojan cirkuleron en Esper-

anto, kiu en senpretenda formo sendiĝus al la membroj por informi ilin pri la agadoj de la Asocio. Sed la ĉefa agado de la Asocio laŭ mia opinio estu la publika informlaboro kaj la reklamo direktita al germanlingva publiko. Elspezi la fortojn kaj monrimedojn de la Asocio por unu plia apenaŭ legata Esperanta klubgazeteto, mi konsideras eraro. Jam nun ekzistas tro da etaj Esperantaj gazetoj, kiujn ĉiujn legi neniu povas, kaj kiuj devas tre peni por pleniĝi siajn kelkajn paĝojn per altkvalita enhavo. Kiom pli sence estus publikigi la vere gravajn informojn kaj diskutojn en unu revuo. Ĝuste por tiu celo ekzistas *Sennaciulo*.

Ni ne timas prezenti al aliaj nian programon

K-do Bues estas unu el la fondintoj de la Libera Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ Hans Rodewig, mi mem kaj multaj aliaj. Ankaŭ ni estis antaŭensturmantaj junaj homoj, sed ĉiam ajn bonvenigis konsil-ojn de pli aĝaj gekamaradoj. Tute aparte de tio, ke konservativaj esperantistoj malalte taksas la geomikojn de la Libera (pli frue: Laborista) Esperanto-Asocio, kio kulminis per la atingajo, ke post la reunuiĝo la gesamideanoj el la Esperanto-Asocio de la eksa GDR preskaŭ bloke, unuope kaj grupe, kuris al la Germana Esperanto-Asocio. Ja kial ne? Unueco estas forto.

LEA/G ne tenas sin aparta kaj tute ne bezonus pravigi sin pro tia dispartigo. Se iu digne reprezentas la atingajojn de la laboristaj esperantistoj de antaŭ 1933, tio estas ni kaj kompreneble ankaŭ krome la esperantistoj de la iama GDR, kiuj ja bedaŭrinde devis sekvi siaflanke

Sennaciulo estas vere internacia gazeto, por kiu estas sence publikigi Esperantlingve. La avantaĝoj estas unuavide evidentaj: *Sennaciulo* iĝus pli interesa kaj enhavoriĉa, dum la Libera Esperanto-Asocio povus utiligi siajn rimedojn kaj fortojn por intensigi sian informan laboron.

Sebastiano Hartviga

[La aŭtoro verkis ĉi tiun kontribuon originale en la germana – tute intence, pro kialoj, kiujn ĝia enhavo evidentigas, kaj ne pro mankanta scio de Esperanto. La Esperantan tradukon faris G.M.]

direktivojn, tiel ke komuna laboro de la laboristaj esperantistoj ne eblis. Ni tenadis kontaktojn (i.a. Bolle en Berlino; ankaŭ mi kolektis miajn spertojn), ni pagis por multaj la SAT-kotizojn. Tiam venis 1989 kaj... (ĉi tie mi ekhaltas, por ke ĉiu leganto povu mem bildigi al si, kion mi celas). Tiel ankaŭ Friedel Bues retenas certan opinion, por ne malutili al kamaradoj, kiuj estas membroj de SAT kaj samtempe de LEA/G kaj GEA/UEA.

Principe ni ne timas prezenti al aliaj nian programon, sed deziras antaŭmalhelpi certajn miskomprenojn.

Tiun «subteni GEA per ĉiuj fortoj» mi aŭdis jam foje antaŭ pluraj jaroj, kiam oni faris al ni la proponon, ke ni bloke kiel tielnomata frakcio submetiĝu al GEA. Ni rompuz la tradicion. Prefere ni drivas plu kiel neatentata (?) – mond-

fremda – Esperanto-asocio, sed restas fidelaj al nia honoro.

Politika celdifino jes, sed ne tro malproksimen en maldekstra direkto pendolanta. Ni estas neŭtralaj, devligitaj nek al la SPD, la verduloj, kristanoj aŭ la PDS. Niaj membroj povas libere pensi kaj agadi, kaj ne estas direktataj de supre. Principan linion ni ĉiuj observas.

Tiurilate mi atentigas pri nia statuto, kiun mi aldonis al ĉi tiu teksto por k-do Hartwig. Krom tio, restas memkompreneble lia afero preferi agadojn de GEJ ol tiuj por LEA/G. Kiel ofte mi jam diris al tiu, kiun koncernas: vi devas resti objektiva.

Albert Stephan

Abrupte renversi la publicistikon de SAT kaj LEA/G ne eblas

Tuj komence mi diru reage al la kontribuo de Sebastian Hartwig (SH), ke mi ĝenerale konsentas kun liaj proponoj. Tamen, mi volas esprimi rezerveojn pri kelkaj punktoj kaj komentojn pri aliaj:

1. La hezitemo montrita de Friedel Bues (FB) en sia artikolo en *Magazino 20* rilate al informiloj pri Esperanto kun akcentite politika enhavo ŝajnas al mi legitima en unu rilato. Kredeble li volas preventi per alvoko al singardemo, ke eldoniĝu sen antaŭa komuna debato superradikale formulitaj broŝuroj kaj flugfolioj – germanlingve – en la nomo de LEA/G. Tia «bremsado» fare de FB tute ne konsternas min. Ankaŭ lian tiuloke esprimitan peton, ke mi precizigu mian sintenon pri alstrebinda socia ordo mi volas fine de ĉi tiu artikolo plenumi. Tamen, en la konkerna artikolo FB «pripublikas» la utilon de specife politikecaj (maldekstraj) enhavoj en varbilo pri Esperanto. Pri tiu vidpunkto SH ne konsentas. Ĝi vekis lian fortan kontraŭreagon. Pri ĝi ankaŭ mi ne konsentas, sed mi kredas optimisme, ke eblos dispeli tiajn dubojn ĉe FB kaj aliaj per konkretaj

specimenoj de tia proponita informado.¹

2. Diskutenda restas ne nur la problemo de la politika tendenco en la informado, sed tiu de la alparolenda celgrupo. Ĉu salajruloj ĝenerale (depende laborantaj homoj) estu konsiderata la celgrupo? El diversaj opiniesprimoj eblas konkludi, ke multaj LEA-anoj vidas la aferon tiel. Ĉu maldekstraj medioj, pri kiuj SH parolis, estas la ĉefa celgrupo? Ankaŭ mi interesiĝas pri tiu medio kaj la maniero alparoli ĝin. «Depende laborantaj homoj» estas la granda plimulto en la socio kaj ne homogena medio kun

¹ Al la dubantoj kaj aliaj mi rekomendas rigardi la broŝuron *Was ist Esperanto? Wozu Esperanto?*, eldonitan de la Maldekstra Forumo kaj grandparte verkitan de mi persone. Tiu rekomendo ne signifas, ke mi vantas per ĝi, ĉar mi konscias pri ĝiaj presteknikaj kaj enhavaj mankoj. Sed ĝi ekzempligas mian koncepton pri la rilato inter priesperantaj kaj politikecaj enhavoj. Ĉiu povas espereble konvinkiĝi, ke mi ne celas publici strangan miksaĵon el politika manifesto kaj Esperanto-informilo, kaj tio validas ankaŭ por aliaj membroj de la Maldekstra Forumo.

specifa politika tendenco. Ĉu eblas sin direkti al tiu medio alie ol la ĝisnuna «neŭtrala» informado faras? Ĉu eble fari apartan materialon por spektro de diversaj celgrupoj? Tiun alternativon mi preferus – oni vidos. Ĉu tio estas tro ambicia ideo. La demando pri la celgrupo estas ankoraŭ ne respondita.

3. Jam la (verŝajne ampleksa) diskuto pri informado, celgrupoj kaj politikaj tendencoj postulas internajn komunikilojn, kiu ne estu pli modestaspektaj ol necese, ĉar ili popularigu la temon kaj la debaton inter esperantistoj.
4. Unu faktoro, kiu malhelpas (kvankam ne malebligas) tuj komenci internacskalan debaton pri demandoj de informado, estas la manko de komuna diskutbazo konsistanta el Esperantaj tradukoj de priesperantaj informiloj! Jen natura kialo, pro kiu tiaj debatoj ekevoluas sur LEA-nivelo.
5. La doktrino pri labordivido rilate al peresperantaj kaj poresperantaj agadoj de SAT kaj la LEA-oj malhelpas debati movadaĵojn en *Sennaciulo*, la organo de organizado, kiu komprenas sin pure *peresperanta*. Mi persone opinias, ke tiu doktrino faras SAT postranga en la Esperanto-movado, al kiu ĝi striktasence eĉ ne apartenas, sed tio estas jam alia temo. Restas la LEA-oj, kiuj laŭ tiu doktrino plenumu la *poresperantan* agadon. Se ili komprenas tiun kiel aferon sen politikaj implicajoj, ili necese devas fariĝi «malbonaj kopioj» de la «neŭtralaj» originaloj, kiel SH prave konstatis. Inteligente konceptitaj agadoj estas ofte samtempe *peresperantaj* kaj *peresperantaj*. Ankaŭ la informado pri Esperanto devas esti politikeca plej malfrue, kiam oni devas klarigi la celon de la tuta Esperanta afero (amuziĝo, novtipa diaspora komun-

umado kiel memcelo, baldaŭa fina venko per agado ĉe politikistoj kaj aliaj gravuloj, fina venko en fora estonteco post plenumiĝo de sociaj-politikaj antaŭkondiĉoj). Nuntempe regas sinteno en SAT-medioj, kiu instigas diskuti pri tiaj demandoj en gazetoj kiel *Magazino* kaj *Laŭte*, kaj ne en *Sennaciulo*.

Malgraŭ miaj rezervoj, kiuj ĉefe rilatas al la ebleco de *tuja* publicistika revolucio, mi konsideras la konkretajn proponojn de SH esence pravaj. Se la publikan informadon prizorgus internacia laborgrupo en SAT kun filioj por apartaj lingvoteritorioj, kaj se la kompreno en la SAT-medio pri peresperanteco/poresperanteco estus pli holisma² (alivorte, se okazus ia ĝenerala organiza reformo), tiam licus demandi, ĉu la LEA-oj kaj iliaj gazetorganoj plu havas ekzistokialon.

Mi konsentas, ke oni jam nun okupiĝu pri germanlingva informado kaj tiucele stucu la *Magazinon* modere (se bezonatas kaj entute eblas).

«Radikale alia socio»

Nun mi volas respondi la demandon, kiun FB prezentis en la lasta *Magazino*: kiel mi imagas «radikale alian socion», kiu laŭ mi rilatas al Esperanto, kaj la vojon al ĝi.

Laŭ mi, tiu socio ne povas esti alia ol konsekvence egalisma en monda skalo, do alstrebi efektivan poioman materialan kaj socirolan samniveligon de homoj ĉie en la mondo. Ĝi devas esti konsekvence demokratia, t.e. ebligi al individuoj libere kundecidi pri ĉiuj aferoj, kiuj koncernas ilian personon. Ĝi devas esti socialisma en tiu senco, ke

² rigardanta kaj traktanta kompleksan aferon tutece kaj ne polemente

ĉiuj iom grandaj produktaj rimedoj troviĝos en iu formo de *aŭtentika* kolektiva aŭ socia proprieto, alivorte, ke plenumiĝos *demokratia mastrumado* ĉe la proprietoj. Ĝi devas esti «ekologia», t.e. ebligi longdaŭran kunekzistadon de la homara socio kaj la naturo. Ĝi devas esti en pli alta grado klera socio ol iu ajn ĝisnuna. Ĝi devas respekti la rajton de la individuo evoluigi sian personecon. Ŝajnas al mi, ke ĉiu el la nomitaj kondiĉoj estas nepra, se ekzistu io, kion oni rajte nomu «radikale alia socio» aŭ socialismo.

Se mi sciis *la vojon* por atingi tiun socion, mi verŝajne entreprenus fondi partion, eble eĉ internacion. Mi supozas, ke ĝi estos longa kaj sinua kaj tre varia, kaj – depende de la etapo kaj la mondoparto – parte revolucia kaj parte reformisma/parlamentisma. La vojo devos esti pli paca ol perforta, ĉar militara strategio postulas militaran organizaĵon, kaj tia ne povas esti emancipa instanco.

*pli da novaĵoj sur
paĝoj 13 kaj 24!*

novaĵoj

Nova Esperanto-kurso en la reto

Pretigiĝis jam nova Interreta Esperanto-kurso por germanlingvanoj! Ĝin ellaboris membroj de la grupo *Karapaco* en Turingio surbaze de kurso aperinta felietone komence de la 70aj jaroj en la (orient)berlina tagjurnalo *Der Morgen*. Rigardu la paĝaron de Freie ArbeiterInnen-Union (FAU):
<http://www.free.de/FAU/texte.html>.

SAT-Junulfako revivas

La Junulfako kunvenas regule en Parizo kaj intencas reeldoni la *Junan*

Per tio mi preskaŭ finis. Mi ne sentas min kapabla verki tutan manifeston. Sed mi aldonu ion pri la laŭ mi ekzistanta senpera rilato inter ĉio ĉi kaj Esperanto. En monda socio, kiu en signifa grado kaj konscie reformos la homan kunvivadon en la priskribita senco, egalisma solvo de la lingva problemo havos ŝancon esti serioze pritraktita – alie ol nun. Nun estas malŝparo de energio agiti ĉe parlamentanoj kaj oficialuloj kun la celo, ke ili antaŭenpuŝu Esperanton al monda oficialiĝo. Sed eblas publike informi pri Esperanto, pri lingvaj privilegioj kaj diskriminacio laŭ maniero ne sloganeca aŭ kriĉa, sed politike eduka, samtempe teme specifa kaj ĝenerale-politika, kiu perceptigas la abisman neegalan distribuon de ĉio vivgrava ene de la monda socio, kaj la neceson ŝanĝi la aferstaton.

Gary Mickle

Penson. Jam eblas direkti mendojn kaj donacojn al SAT/Parizo. K-do Julien Boesel estas nomita junulara reprezentanto por la P.K.

Distribua Ekonomio

La SAT-Frakcio por Distribua Ekonomio planas internacian renkontiĝon de esperantistoj kaj membroj de SIL-grupoj (sistemoj de interŝanĝo loka), kiu okazos apud Montpellier 1998 07 28-30. En ĝi Esperanto uziĝos kiel pontlingvo. Prepara alvoko kaj aliaj informoj haveblas de René Ballaguy, 12 rue du CDT Cousteau, FR-95 000 Boisemont aŭ el la reto ĉe <http://www.perso.hol.fr/rballagu/>

Novajo sur la librobretaro

Gura

Vualo de l' sileto

La lasta kovrilpaĝo de la libro resumas la enhavon, pli bone al mi povas fari:

Juna kabilino estas mortkondamnita de sia familio, ĉar ŝi transpaŝis la praajn regulojn kaj elektis kiel vivkunulon francon kaj generis kun li infanon.

Tio okazis en Parizo, en 1987, kaj la viktimo de tiu "punekspedicio" estas ja la aŭtorino mem de tiu libro.

En VUALO DE L' SILENTO ŝi ne nur rakontas tiun dramon. Ŝi ankaŭ kunprenas nin en la magion de la kabila montaro, priskribas la tragikan folkloron de la helpdomaroj por gastlaboristoj, kaj vipas sen ia ajn politika antaŭjuĝo la nekredible arkaismajn vivkondiĉojn de iuj islamaj virinoj en la nuntempa Eŭropo. "La vualo", kiun la aŭtorino levas ĉi tie, najbaras al seriozega aktualaĵo, kiu ne estas limigita nur al la surmeto de speciala kaptuko.

Travivita romano, subskibita per sango kaj de kiu oni eliĝas konsternita, alipensanta, admiranta kaj informita.

Origina titolo: Djura: Le voile du silence,

Eldonis Michel Lafon, 1990.

Esperantigis: Henri Castiaŭ,

Literatura redaktoro: Nora Caragea.

Eldonis: Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris, 1997

* * *

La tradukisto Henri Castiaŭ, li mortis 1992, skribis en la revuo "LAŬTE" n-ro 96 (Nov-Dec 1991) sekvantan artikolon:

Kian legonton celu la esperantistaj verkistoj?

Kiaj estas la mezaj esperantistoj? Malfacila demando! Certe estas, ke Esperanto en si mem ne estas celo por ili. Malmultaj estas la privilegioj kiuj kaptas la unikan ŝancon, kiun proponas Esperanto por disolvi sian spiritan vivon. Tamen, ni ne lulu

nin en revoj kaj ne esperu ke ĉiuj esperantistoj finlernos la lingvon. Meza scipovo, kun malgranda vorttrezoro, jam estas kontentiga rezulto.

Ni do devas doni al tiu klaso la emon kaj la eblecojn paroli, skribi kaj legi.

Paroligi ilin estas problemo, kiun mi ne pritraktos tie ĉi. Ĝi apartenas al la instruist-rondo. Dezirinde tamen estas ke ni almenaŭ provu mal-ra-pi-de kaj kla-re pa-ro-li tiel ke oni facile komprenu nin.

Skribigi ilin. Estas necese ke la lernantoj tiom frue kiom eble konatiĝu kun leterkorespondantoj el la tuta mondo. Tio devigas ilin skribi esprimi siajn pensojn kaj vekos ĉe ili bezonon al Esperanto.

Legigi ilin. Tiu lasta punkto permesas al mi ekrajdi sur mia amata ĉevalineto. Tie ĉi kuŝas la respondecoj de la verkistoj kaj de la eldonejoj. Kiaj libroj indas esti eldonitaj: tiaj, kiuj plezurige povas esti legataj kaj komprenataj de ĉiuj esperantistoj kiuj atingis mezan scipovon de la lingvo. Tiel verki estas efike labori por progreso de Esperanto. Evitende estas verki por montri ke oni tiom perfekte regas la lingvon, ke oni estas kapabla uzi ĝin ĝis ĝiaj plej kaŝitaj rimedoj. La lingvistaj harfendadoj ne rajtas partopreni en la esperantista festeno.

La tadukantoj, kiuj sengloraj laboristoj, povus doni gravan impulson al la praktikado de la legado. En ĉiuj naciaj literaturoj pli-malpli regule aperas furoraj libroj kiuj ĝuas efikan reklamon en ĉiuj amaskomunikiloj. Ĉu ne estus eble, ke kelkaj tradukantoj, kunlaborante, rapide esperantigu tiajn verkaĵojn, eĉ antaŭ ol ili estas tradukitaj en aliajn naciajn lingvojn? Ĉu niaj eldonejoj farus la pruvon de sia oportunisto, profitante de la jam ekzistanta reklamo kaj aperigante la esperantigitajn versiojn tiom rapide kiom eble? Ankaŭ en tia kazo, la principoj de simpleco, kiujn mi varme pritraktadas, restas oportunaj.

Zamenhof laŭdegis simplan stilon. Ni respektu lian volon. Tio povos nur plibonigi la sanon de nia komunumo.

K.H. Kersting

Kio estas S.A.T.?

La literoj S.A.T. mallongigas la nomon de la „per“ -esperanta movado

Sennacieca
Asocio
Tutmonda

Do, ĝi ne konas limojn.

S.A.T. „naskigis“ en la jaro 1921.

S.A.T. estas unuigo de laborprenantoj, kiuj kontaktas kun aliaj tutmonde por amikecigi kaj interparoli pri viv- kaj laborkondiĉoj.

La ununura komprenilo en S.A.T. kaj inter la membraro estas la

LINGVO INTERNACIA ESPERANTO

S.A.T. ne estas partipolitika,
sed kleriga, kultura organizo.

lom da herezo

„Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto“ (PIV) instruas nin, ke la vorto „taktiko“ eldiras: 1-e Arto aranĝi kaj utiligi la armeojn sur la batalkampo; 2-e Maniero, metodo, uzata por atingi celon. Taktikisto estas specialisto pri taktiko. La analoga vorto por taktiko estas strategio. Cetere frapvorto en esperantistaj rondoj.

Antaŭ nelonge mi ĉeestis kunvenon, kiu havis la belan nomon „simpozio“. Tie ĉefe eminentuloj debatis pri movadaj aferoj kaj elpensis novajn strategiojn. Preskaŭ ĉiuj rekomendoj komencis per la vortoj: „Oni devus fari“.

S.A.T. -sidejo estas en Parizo. En la landoj prezentas honorofice la asocion la landaj perantoj. La peranto en Germanio estas:

Jiri PROSKOVEC
Heimbastr. 10
44143 DORTMUND
☎ 0231 - 551211

S.A.T. eldonas literaturojn kaj aliajn verkojn i.a. la

PLENA ILUSTRITA VORTARO.
Ĝi aperigas la monatan gazeton SENNACIULO.

kiu enhavas interesajn artikolojn el la mondo de la laboro, pri politiko kaj okazaĵoj mondvasse. Ilin verkis la membroj mem en libera opini-esprimo.

S.A.T. liveras ciun duan jaron
ADRESARON.

S.A.T. havas junulfakon kaj memstarajn frakciojn: TANEF (Naturamiko Esperantistaj) ktp. AMIKECA RETO estas socivojaĝa servo.

S.A.T. observas demokratajn regulojn, estas kontraŭ rasismo kaj diktaturo kaj respektas ĉiun pensmanieron, kiu ne estas kontraŭ la homaj bezonoj kaj vivmanieroj (humanismo).

La planoj aŭdiĝis tre raciaj, sed laŭ mi ili estis malprecizaj. Mi ne aŭdis, ĉu la proponantoj disponis pri agantoj, kiuj realigu la planojn, aŭ ĉu ili havas sufiĉe da mono. La impresoj estis, ĉi tie kunsidas manaĝeroj, kiuj ne disponas pri laboristoj. Jam ofte mi legis pri novaj strategiaj planoj, kiuj poste fiaskis, ĉar neniu faris iom.

Mi opinias, antaŭ ĉio estas necese priskribi realisman bildon pri la stato de la movado kaj la intereso de la membroj. Unue niaj taktikistoj devas zorgi, ke la „eternaj komencantoj“ ne dominas en niaj rondoj. La movado bezonas malpli simpatiantojn, sed pli verajn esperantistojn. Nur bone kulturitaj esperantistoj estas konvenaj „multobligantoj“.

Ni ne bezonas kabinetajn taktikistojn.

K.H. Kersting

aldone al:

Kio estas SAT?

de Henri Masson, en SAT-Amikaro (La Parizano), printempo 1990

En 1983, antaŭ la Londona Esperanto-klubo kiun prezidis tiutempe la nuna prezidanto de UEA, *d-ro John C. Wells*, mi havis la okazon prezenti nian asocion kaj ĝian ekzistokialon. Tiu ĉi prelego aperis broŝurforme sub la titolo «Kio estas SAT?».

La celo de SAT estas alia ol disvastigo de Esperanto. Komprenoble ĝi havas intereson en laŭeble plej vasta aplikado de Esperanto en la rilatoj inter diverslingvanoj. Pro tio ekzistas Laboristaj Esperanto-Asocioj ligitaj al ĝi per konvencio; espereble fondiĝos pliaj. Sed per la utileco kaj fidindeco de siaj informoj, per la valoro mem de sia agado, SAT povas multe pli efike kaj konvinke influu favore al Esperanto ol se ĝi estus plia poresperanta organizo.

La nuna situacio en la mondo konfirmas la pravecon de la principoj kaj celoj de SAT, sed ankaŭ de ĝia aktivado kaj sinteno. La rolo de SAT ne konsistas aliĝi al doktrinoj, reĝimoj, partioj, sed ebligi utilan komparon inter ili.

SAT devas firme resti la voĉportanto de la milionoj da homoj, kiuj restis senvoĉaj dum jardekoj, same sub devojiĝinta komunismo kiel sub la ankoraŭ nun tumulta kapitalismo.

Certe la nuna evoluo de la monda situacio estas pozitiva laŭ multaj aspektoj. Forfalis landlimoj kaj murego, idoloj kaj tiranoj. Malaperis obstakloj al interrilato kaj interŝanĝoj. Ekestas nun rilatoj, se ne de amikeco, almenaŭ de kunlaboro inter landoj konsiderataj nur antaŭ kelkaj monatoj kiel apartenantaj al malamikaj blokoj. Perspektivoj de senarmigo ekaperas en Eŭropo, kiu estis foje ĉe

la rando de gravaj konfliktoj. Plifortiĝas ĉie la konscio pri neceso respekti la naturon. Tiu ĉi grava transformiĝo okazas sen milito. Tamen la horizonto estas nek hela nek klara. Aperas kompleksaj problemoj.

Malfortiĝo de regpovo, kia ajn ĝi estas, neeviteble estigas alfluron de diverstendencaj fortoj, kiuj provas okupi akapari la forlasitan lokon.

Primitiva interpreto de religiaj preceptoj, principoj aŭ dogmoj starigas kreskantan minacon, kiun oni estus supozintaj aparteni al fora pasinteco. Religio ree fariĝas mensa narkotaĵo de popoloj. Multege da individuoj tra la mondo ankoraŭ inklina kulti iun dion en kiu fakte respeguliĝas ilia propra psika konfuzo kaj pervers(i)eco. Miksiĝas malracia pensado, fasciniteco, naiveco, obseda kredo, mensa ebriiĝo, histeria eksciteco, fanatikeco, krueleco kaj senrezerva submetiĝo al tutpovaj gvidantoj. Tiaj mensostato kaj sinteno estas en absoluta kontraŭdiro kun la noblaj ecoj, kiujn kredantoj atribuas al sia dio, t.e. senlima amo, boneco kaj justeco.

Rilate al politiko same kiel al religio, ekzistas kredantoj kaj kredemuloj. Ekzistas sinceraj homoj absolute honestaj, kiuj tro facile kredas je la sincereco, klarvideco, senerareco, lojaleco kaj skrupula honesteco de siaj gvidantoj. Blinda akcepto de dogmoj ambaŭkaze kondukas nur al same monstra soci-(mal)ordo.

SAT devas absolute kaj rigore konservi sian planan liberecon kaj sendependecon rilate al kiu ajn partio, religio, filozofio, doktrino kaj reĝimo tute

same kiel rilate al kiu ajn nacio. Oni povus eĉ aldoni al la SAT-slogano: «SAT-anoj kutimiĝu al eksterpartia (reĝima, doktrina, religia, filozofia, skola, ktp...) sent-, pens- kaj agadkapablo.» Nur tiel ĝi povos utile atentigi pri danĝeroj de devojiĝo, kaj tiel plene servi la laboristaron, kaj finfine eĉ la tutan Homaron.

De individuoj, kiuj senĉese atakis, misprezentis, aĉe insultis SAT, denuncis ties membrojn tiel ke ili estis foje viktimoj de persekutoj kaj devigataj ekŝiĝi el nia Asocio, ni certe ne devas akcepti lecionojn de demokrateco, de toleremo.

Ni ne miru se iu grupo, kies gvidantoj senrezerve aprobis kaj laŭdis reĝimojn kiuj silentigis milionojn da laboristoj dum jardekoj (inkluzive de multaj komunistoj), nun pretendeme kaj aplombe proklamas sin kiel avangardon de glasnosto kaj perestrojko, por kiuj fakte nur SAT senĉese kaj konkrete aktivis jam de sia fondiĝo! Tiam ekzistis ne la vortoj, sed ja la principoj. Ni ne miru, ke ĝuste kelkaj el ili plej brue prezentiĝas kiel ĉampionoj de kunlaboro, kvazaŭ de novnaskitoj ili havus moralan virgecon, senkulpecon. Ni ne miru, ke en ilia vortaro kutime insulta al SAT aperas subite mildaj vortoj kiel «toleremo», «kunlaboro» ks. Tamen la insultoj kaj minacoj reaperas ne malpli subite se troviĝas homoj sufiĉe klarvidaj por ne jesi al tia prozelita flirtado... Ne sufiĉas laŭvoĉa aroganta proklamado favore al perestrojko kaj glasnosto. La principoj de entruĝo en organizoj (aŭ enkeriĝo; t.e. france: *noyautage*) tute ne malaperis el la strategio de iamaj stalinistoj. Jam unu fojon SAT spertis tion fine de la jaroj '20. Tio sufiĉas!

Multege da honestaj komunistoj ne meritis tiun baton. Certe kun ili ni devas rilati kompreneme kaj fratece, se ili

humile agnoskas, kun efektiva bedaŭro, ke pasive aŭ aktive, ili erare subtenis fireĝimojn; se ili pravas per konkreta agado ke ili volas malebligi tian refalon. Ne ekzistas homo, kiu iam ne estis pli malpli grave trompita. Certe ni devas kompreni kiom amara estas tia seniluziĝo por homo, kiu malavare forferis la plej grandan parton de sia vivo por idealo, kiun aliaj homoj senskrupule makulis, kaj kiu konstatas, ke malantaŭ sloganoj estis ne nur mistifiko, mensogo, trompado, sed ankaŭ koruptado, maljusteco kaj eĉ nenombreblaj krimoj.

Kiu el ni ne konstatis mensostaton de klasmalamiko ĉe iuj laborkolegoj, inklinton kondukti malpli noble ol iamaj aŭ nunaj ekspluatistoj? Tio estas kialo de la perversa devojiĝo de politika povo pseŭdolaborista, kiu naskis specon de gvidantoj pli emaj zorgi pri propraj interesoj. Klasa ŝovinismo ne kredigu, ke riĉulo estas nepre malhonesto, entreprenestro senskrupula, intelektulo perfida, deputito ne nobla, nobelo reakcia, militisto sangavida, religiulo fanatika, kaj ke nur malriĉulo estas honesto, nobl-anima kaj laborema. «Estas bonuloj ĉie; estas fiuloj ĉie», diris simpla araba balaisto de mia entrepreno.

Tio cetere levas gravan demandon pri ekzistokialo de la vorto «klasbatalo» en nia statuto.

* * *

Patrino kune kun sia fileto sidas en la tramo. Suspekteme rigardas la konduktoro la malgrandulon kaj demandas: „Kiun aĝon li havas, sinjorino?“

„Kvar jarojn“, la patrino respondas fiere, kaj tio estas ĝusta.

„Bone“, la konduktoro diras kaj malrapide pluiras. Sed al la knabeto ŝajnas, ke la konduktoro ankoraŭ deziras scii ion, kaj tial li laŭte krias: „Panjo havas dudek kvar!“

Disdonado de flugfolioj

Mi legis la artikolon pri la temo kaj gratulas esperantistojn en Berlino pro iliaj aktivecoj de distribuo de t.n. flugfolioj kaj malvolvo de sloganbendo. Krome, dankon por standoj, kie vi havas eblecon informi la publikon pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Laŭ mia opinio, flugfolioj bone taŭgas por varbi, kiam la aspekto kaj teksto de la folio alparolas ne nur junajn sed ankaŭ maljunajn homojn. Kompreneble, la Esperanto-movado bezonas novan generacion, junajn fortojn, sed por ili mi rekomendas specialan flugfolion.

Antaŭ preparo de la folioj, la estraro kaj membraro de GLEA / LEA/G devas scii, kiom da markoj (aŭ eŭroj) la afero kostos. Se la GLEA-kaso ne enhavas sufiĉe da mono por financi flugfoliojn, ĉar oni samtempe devas pagi por eldonoj de *Magazino*, la estraro verŝajne devus peti gemembrojn pri donacoj.

Mi proponas al nia *Magazino*-ĉefredaktoro ellabori taŭgajn flugfoliojn kaj prezenti la rezultojn al la Estraro.

La germanlingvaj tekstoj, kiujn Gary montras sur paĝoj 6 kaj 7 de *Magazino* 20 estas tre bonaj kaj taŭgaj. Mi nur kritikis uzon de fremdaj vortoj en germanaj tekstoj, ĉar ne ĉiu homo scipovas tiajn esprimojn. Ankaŭ, mi ne ŝatas la esprimojn «Klassenkampf» [klasbatalo (red.)] kaj aliajn, kiuj eble liveras al la konservativuloj eblecon montri, ke laboristoj ne estas pacemaj. Laboristo estas ĉiu, kiu laboras, ĉu en fabriko, oficejo, en sia hejmo, kiel pastro, ĝeneral-direktoro aŭ alie. Pro tio ne plu ekzistas klasoj, sed nur homoj kun multe da mono kaj tiaj, kiuj baldaŭ havos nenion por manĝi.

Flugfolioj estu buntaj kaj modernaj, do alparolu gejunulojn. Samtempe, kiam

varbado eble havus sukceson, oni bezonus eblecon studi Esperanton, ĉu en popolaltlernejo, en Esperanto-grupo, per teleinstruo. La grupoj, kiuj disdonas varbilojn, zorgu pri studeblecoj kaj lerneblecoj.

Ŝtefano

Kelkaj kritikoj de K. H. Kersting pri la flugfolio de Maldekstra Forumo prezentita en *Magazino* 20. (Oni atentu, ke temas pri resumo farita de GM surbaze de manskribitaj notoj de KHK, do ne estas precize liaj vortoj.):

- 1: Ne necesas alia tiparo por la titoloj.
- 2: La persono de Zamenhof ne nepre estu elstarigita komence.
- 3 kaj 4: La eldiroj ne impresas kontraŭ-usonismaj, sed la maldekstra lingvaĵo povas iom fortimigi kelkajn.
- 5: La bildoj entute ne necesas.
- 6: Esperanto havas ĉirkaŭ 70 000 parolantojn.
- 7 kaj 9: Estas multe tro da ne ĝenerale komprenataj «fremdvortoj». Vortojn kiel *phonemisch*, *agglutiniierend*, *lexikalisch* komprenas maksimume 1% de la homoj en Germanio.
- 8: Rilate la argumentadon per la motivo «monda paco», KHK demandas, ĉu la esperantistoj mem estas pacemaj?
- 11: Oni ne diru pri Esperanto, ke ĝi estas *facila* lingvo.
- 12: Pro la eventuala manko de larĝskalaj venkoŝancoj kulpas la esperantistoj grandparte mem.
- 13: Responde al la demando, ĉu la flugfolio ne porparolas malaktualiĝintajn esperojn kaj celadojn, KHK konstatas, ke li estas je 80% raŭmisto.

*pli da novaĵoj sur
paĝoj 7 kaj 24!*

novaĵoj

Esperantistoj ĉe la Luxemburg/Liebknecht- manifestacio en Berlino

Jam la trian jaron membroj (ĉi-foje nur du) de la Maldekstra Forumo partoprenis tiun ĉi manifestacion, kiu pli kaj pli instituciigis kiel komuna manifestacio kaj renkontiĝo de berlinaj maldekstraj grupoj kaj partioj. Ili portis sloganbendon ĝis la antaŭplaco de la Memorindigejo de la Socialistoj kaj reen. Ĉi-foje ili disdonis nur modestan nombron de flugfolioj.

La partoprenintoj konstatis memkritike, ke tro malfrue oni definitivigis siajn planojn, tiel ke ne plu eblis sciigi aliajn eventualajn kunmarŝantojn. Ili hazarde renkontis tri aliajn esperantistojn kaj ne eblas taksu, kiom da pliaj estis. En la pasintaj jaroj ariĝis pli granda grego.

Jus aperis: *Per Esperanto – por aŭtentika informado de Nikola Aleksiev*

Redaktis kaj produktis Detlev Blanke. Berlin, Blanke: 1998, 122 p. (bindita manuskripto).

Nikola Aleksiev (1909) estas unu el la plej konataj kaj rimarkindaj figuroj de la postmilita Esperanto-movado. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio kaj de Mondpaca-Esperantista Movado. Li krome tre aktivis en UEA, kies honora membro li estas. Profesie li estis ĵurnalisto. Post la drastaj politikaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo, pro aĝo kaj sankauzoj, li ne plu tre aktivadis en la movado, sed ja multon publikigis. Li komentis en multaj artikoloj la politikan

evoluo en Bulgario kaj ankaŭ kritike rezonis pri la kialoj de la fiasko de la t.n. socialismo en orienteŭropaj landoj, kompreneble aparte traktante pri Bulgario mem. Li krome verkis multe pri esperanto-movadaj kaj movadhistoriaj temoj, verkis libron pri la historio de la Esperanto-movado, krome redaktis dokumentaron pri la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE, 1932-1939) kaj pri la «bulgara Ostrovski» Trifon Ĥristofski. La verdkovrile bindita materialo entenas pli ol 60 el liaj artikoloj, recenzoj kaj reagoj al aliaj materialoj (la materialo prezentas ankaŭ la polemikitajn materialojn mem). Tiujn tekstojn li verkis inter 1992-1997. Enestas krome ampleksa enkonduko kaj kelkaj komentoj de Blanke, krome studoj *el der esperantist*.

La tuto ebligas al la leganto konatiĝi kun la nunaj vidpunktoj de la aŭtoro kaj konstati, ke Aleksiev ne nur konservis siajn bazajn politikajn konvinkojn, sed ankaŭ ne perdis sian bataleman kaj kritikan spiriton.

La materialo estas ricevebla rekte ĉe Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: +49-30-54 12 633, fakso: +49-30-54 56 742. La (eventuale?) enspezotan monon Blanke utiligos por Nikola Aleksiev, kiu ne nur estas malsana, sed ankaŭ havas materiale tre pezan vivon, kiel nun kutime en Bulgario – almenaŭ por la plej multaj civitanoj.

La manuskripto kosta 18 germ. markojn aŭ 20 guldenojn. Pagante al UEA oni ĝiru 20 guldenojn al la konto dtlv-h (aldonu: por Aleksiev). Pagante en Germanio oni sendu 18 germ. markojn al la konto de Detlev Blanke, 44076142 (aldonu: por Aleksiev), Berliner Sparkasse, bankkodo BLZ 100 500 00.

Infanstriko

de Ivar Lo-Johansson
tradukita de F. Szilágyi

En Kjula en Sörmland loĝis en XIX-a jarcento bienservisto, kiun oni nomis la Forta Andreo, sed cetera lia nomo estis Andreo Andersson, unu el la sennomuloj, kiu sen sia forto estus restinta ĉiam sennoma. Jam kiel infano li pruvis sian neĉiutagan korpan forton. Li iĝis dum siaj junaj jaroj junservisto en Barva, kaj tie li prezentis sian unuan veran fortoprovon. Iun tagon dum la tagmeza paŭzo la viroj amuzis sin per tio, ke ili provis kurbigi du ferrelojn, eligantajn el iu magazeno. Du el ili sukcesis nuancete fleksi supren la relojn. Iu ŝerce demandis la junan kortserviston, ĉu ankaŭ li volus fari provon. Andreo staris sen-vorta momente, nesciante, ĉu li efektive rajtas partopreni en tiu ĉi fortprovo de la pli aĝaj. Fine li iris antaŭen, kvazaŭ li ekprovus, faris certan prenon je je ĉiu relo, malrapide leviĝis kaj je la konsterno de la ĉirkaŭstarantoj fleksis ambaŭ ferrelojn alten al la muro. Ion tian neniu atendis. De tiam flugis la famo de Andreo trans tutaj parofoj de Sörmland. Li faris multe da fortoprovoj, li mem estis pensmalfrua, ne precipe inteligenta cerbe, faris la laboron de multaj viroj, se oni iom flatis lin, kaj la sinjoroj lin elsuĉis. Li edziĝis, kiam li atingis la ĝustan aĝon kaj iĝis bienservisto.

Post kelkaj jaroj li venis al la bieno F. en la parofo distrikto Jeder kaj restis tie ĝis sia morto. Dum la lastaj jaroj li trostreĉis sin per levado kaj iĝis pulmomal sana. Lia morto okazis inter dramaj cirkonstancoj. Tio okazis en la sama tempo, kiam la unuaj organizaj pensoj atingis la ebenejan bienservistaron de Sörmland. Tial ĝi estu prezentata per aparta rakonto.

✱

Aŭtune vekigis la burdigiganto de la draŝmaŝino je vivo en la kortangulo. Ankaŭ la infanoj oni priuzis en la produktado. Por gvidi la nedraŝitan grenon al la profunda grenplanko oni uzis longan ĉenon da infanoj.

Ofte estis pli ol dudek infanoj, dekjaraj kaj dekdujaraj, kiuj volis prefere ludi kaj kiuj suferis terure pro la lumkuboj de la draŝaperturo, polvo, tondro kaj skuado.

Ili do staris tie vice, ĵetis la grenfaskon al la sino unu al la alia, ĝis la lasta en la vico metis la grenfaskon supren al la apertura tablo, post kiam la „nutranto“ iĝis la faskon disfiltrigi en la draŝcilindro.

Ekster la tremantaj draŝejmuroj 6 — 8 paroj da bovoj, gvidataj de subservisto, tiradis en rondo la draŝmaŝinon grandan, kaj provis ŝtele surtrieti la bartrabojn. La tondrado de la draŝmaŝino plenigis ĉiujn valojn. Sur la alia flanko de la grenejo kreskis la pajlo, je stakoj, similantaj flaveblankajn montarojn. Interne sur la planko kuŝis musidoj en etaj, vilaj nestoj. Sed la infanoj devis labori! Por 12-hora laboro ricevis ĉiu infano pagon de dek-du oeroj.

Tiam okazis dum la draŝtempo, ke agitisto venis piede de alia bieno. Li eniris la grenejon dum la tagmanĝ-paŭzo kaj diris al la viroj:

— En nia farmo ni ricevas pli da mono, ĉar ni minacas, ke alie ni ne laboros. La sinjoroj lernu pagi! Ni faris tion tuj antaŭ la draŝado.

La draŝantaro demandis pri io kaj alia, kaj povis aŭdi, ke tiuj en la najbara farmo iris simple al la arbaro, sed ili opiniis, ke tio ne konvenas por ili.

— Se ili ne havas nin, havas la aliajn, ili diris.

— Sed se ne ekzistas tiaj, kiujn ili povas havi? demandis la servisto el la fremda bieno. Fine li turnis sin al Forta Andreo kun sia demando.

— Labori estas ja tio, kion mi pleje kapablas, li diris post momento. Kaj se mi havus ĉiujn kontraŭ mi, mi povus labori same multe kiel ĉiuj kune.

La agitisto foriris. Sed la infanoj en la „ĉeno“, kaŝitaj en la grenfundo, aŭskultis. Ili opiniis la planon ne malprudenta. Se ili ricevos 25 oerojn anstataŭ dek-du, ili daŭrigos la laboron, sed alie ili kuros arbaren.

Tuj antaŭ ol ili volis komenci, venis la inspektoro survoje al la grenejo. Kiam li turnis sin ĉirkaŭ la angulo, ĉiuj infanoj staris tie.

— Ni volas havi dudek kvin oerojn tage! Alie ni kuros arbaren, ili kriis.

La inspektoro nur ridis. Li daŭrigis al la granda, lignokrenela draŝmaŝino por doni ordonon pri laborkomenco. Sed atinginte la duonvojon, li tamen turnis sin.

— Eniru nun, ĉar ni komencos sammomente, li diris al la infanoj.

La infanoj restis obstine, ĝis la draŝmaŝino ekmuĝis tie interne, sed kiam la inspektoro

elvenis kaj montris la bastonon al ili, escepte unu, ili ekkuris ĉiuj arbaren.

Nun okazis io rimarkinda, ke malgraŭ tio, ke la draŝmaŝino rondiris, ĉiuj radoj movis sin, la maŝino muĝis, tamen ne venis greno. Neniu troviĝis por distranci, nenio troviĝis por ŝtopiĝi en la cilindron. La apertura breto estis malplena. La draŝiloj frapadis la nenion. La lagroj minacas esti varmaj. La tuta infanĉeno estis fuĝinta al la arbaro.

La inspektoro iris al la viroj ĉe la stakoj, similantaj flav-blankajn montojn, kaj diris:

— La infanoj forkuris escepte unu. Mi fakte bezonas kvin homojn por alporti la grenfaskojn, sed kiel estus, se mi havus nur unu, kiu superas vin ĉiujn? Se mi elektus vin, Forta Andreo?

Forta Andreo pensis tireme kaj respondis fiere:

— La laboro estis tio, en kiu mi estis la plej forta pli frue, kaj certe mi faris ofte la laboron de kvin homoj, tiel ke ankaŭ nun mi bone povos fari tion.

Tiam Forta Andreo paŝis en la grenejon, grimpis malsupren al la profunda grenplanko, iris al la ekstremo de la muro, pikis la forkegon en kunpakitan amason, kiu estis granda kiel duona ĉevalŝarĝo kaj ekprenis. Rimarkante, ke ĉiuj restas kaj admiras lin, li metis la ŝarĝon surdorsen. Kun ĝi li iris al la apertura breto, kie la tie forgesita knabo staris preta por fari la disstrancadon. La knabo preskaŭ dronis sub la amso.

De la grenejo kriis nun la servistoj sub la gvido de la inspektoro:

— Lin oni povas nomi viro. Li laboras anstataŭ dudek, kvankam anstataŭ infanoj!

Forta Andreo ŝajnis iom ofendita. Li respondis tra la bruoj:

— Nun mi nur ekproveto. Sed venontfoje sekvos la ĝusta plenbrako!

Li returnis sin, tordis la forkegon en la greno tiel profunde, ke eĉ la tenilo ŝajnis malaperi en ĝi.

Sed nun okazis io neatendita, kiel pli frue, kiam li fleksis la unuan fojon la ferrelojn. Kiam li nun devis levi la ĉevalŝarĝo grandan amason, li haltis duonfare. Li lasis subiĝi la plenbrakon. Li provis denove. Ĝenete li kapt-hezitis al la aero, iĝis kadavre pala, klinis sin mem super la amason. El lia buŝo rompis vojon sangondo kaj ruĝigis la grenon. Tuj poste li

kolapsis. Li ekkuris rekte-etendite en la greno.

Tiuj, kiuj staris plej proksime en la grenejo, kuris suben al la polvkirlita grenplanko. Ili turnis lin dorsaltere kaj fine elportis lin al la libera aero. Ankorau li spiris malfacile.

Tiam li ankoraŭ foje leviĝis, ekdisigis la brakojn, forskuis ilin, kiuj lin tenis, kaj ŝajnis etendi la manojn al la forkego. Li provis diri ion sed sango venis. Post sekundoj li estis mortinta.

✱

La draŝmaŝino, kiu funkciis malplene jam tro longe, devis pleniĝi, kaj ĉiu devis labori, kaj tuj, kiam la mortinto transportiĝis sub la tegmenton de servista kabano, oni devis kuri tuj en la arbaron kaj krii, ĝis oni ricevis respon-

don:
— Vi ricevos dudek-kvin oerojn! Revenu tuj! Dudek-kvin! Revenu!

Ili kriegis en la arbaro.

— Nun vi ĉiuj povas atesti, aŭdiĝis la respondo post la arbustoj kaj supre sur la abioj.

— Hola-ho, vi en la tuta arbaro! Nun vi estas niaj atestantoj, ke ni ricevu, kiom ni postulis.

— Dudek-kvin oerojn!

El SVEDA NOVELARO.

eldonita 1950 de Sveda Laborista Esperanto-Asocio

Cu vere?

Konstateble:
La esperantistoj ne havas memoron.
Ĉiujare denove ili forgesas pagi kotizojn kaj abonojn.

Raymond Schwartz
(Sennacieca Revuo 1966)

Tial bv. ĝiri la kotizon/abonon = 15.- DM
al la kasisto:
K.H. Kersting, Postbank Essen
n-ro 416210432 (BLZ 36010043)
Pripensu: Pagopostulaj leteroj estas tro multekostaj.

Recenzo

Ino Kolbe: Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig (Westsachsen) partoj I kaj II; eldonita, komentita kaj prilaborita de Detlev Blanke; Landesverband Sachsen des Deutschen Esperanto-Bundes e.V. 1996; ĉ. 200 paĝoj

La aŭtorino Ino Kolbe estas unu el la malmultaj vivantaj atestantoj pri la laborista Esperanto-movado en la epoko antaŭ la enpotenciĝo de faŝismo en Germanio, pli specife, pri eventoj el la historio de GLEA kaj la siatempe fortega laborista Esperanto-grupo de Lepsiko «Frateco», kies ĉefmotoro estis ŝia patro Reinhold Voigt, ankaŭ grava aganto en GLEA ekde ĝia fondo, kiun li mem partoprenis. Detlev Blanke estas konata fakulo pri la historio de la laborista Esperanto-movado kaj kontribuis al la libro per ampleksaj komentoj kaj redakta kunhelpo.

Ĉi tiu libro estas vere monumenta materialkolekto, kiu koncernas la periodon ekde la unuaj komencoj en 1909 ĝis la malpermeso en 1933, kaj kies temamplekso en signifa grado transcendas la pure lokan kadron de okcidenta Saksio.³ Ĝi ne pretendas esti definitiva, pri-taksa historiografia verko, kvankam d-ro Blanke skizas kelkajn el la (ne laste politikaj) problemoj ligitaj kun tiu plenumenda tasko. «Materialkolekto» en ĉi tiu kazo absolute ne signifas, ke temas pri seka legajo – tute male, la cititaj dokumentoj parolas por si mem kaj bonege redonas la etoson de la tiama politike

³ Tre specifajn informojn pri la enhavo la interesita leganto trovos en la recenzo de Friedel Bues, kiu aperis en *Sennaciulo* 1996 12 (p. 132-133)

frakciita laborista medio. Do tre instrua, interesveka libro, pri kiu oni povas nur esperi, ke iam aperos Esperanta traduko.

La tiama interkontestado de SPD kaj KPD estas unu ruĝa fadeno, kiu tiriĝas tra diversaj pritraktoj – la komunista tendenco absolute dominis inter la saksaj laboristaj esperantistoj. Multaj eventopriskriboj elvokas irizan mikson de sentoj: forpuŝiteco, kiam temas pri la aĉa persona interrilatado de malsam-tendencaj laboristaj esperantistoj, bedaŭro pri ilia nekapablo adopti la de Lanti rekomenditan universalan skeptikemon kaj sendogmecon (kiam temis ekz. pri la rilato al la propra partio aŭ Sovetunio), sed samtempe sincera admiro de ilia kapablo integri laŭ memkomprenebla maniero la poresperantan laboron kun la politika laboro de sia branĉo de la maldekstro, ankaŭ de la konstante montritaj – necesaj sub la konkretaj cirkonstancoj – rezoluteco kaj kuraĝo fronte al la persekutado venanta de ŝtataj instancoj.

Ekzemplo de tiuj kvalitoj, ilumina en pluraj rilatoj, estis la eldono de la *Völkerspiegel* («Spegulo de popoloj») inter januaro kaj oktobro de 1924. En oktobro de 1923 elektiĝis laboristaj registaroj en Saksio kaj Turingio, kiujn la centra ŝtato flankenigis en la sama monto per arma forto. La puĉintoj de la burĝa ŝtato malpermesis nun la komunisman gazetaron, al kiu apartenis la *Sächsische Arbeiter-Zeitung* («Saksa Laborista Ĵurnalo»). Rondo de aktivuloj rapide fondis la *Völkerspiegel* por provizore anstataŭigi ĝin. Aperis entute 16 numeroj, kiujn la gazetportistoj liveris anstataŭ la SAZ. Ĝi enhavis preskaŭ ekskluzive materialon ĉerpitan el la proleta Esperanto-gazetaro: *Sennaciulo*. Nova Epoko kaj aliaj. Jen ekzemplo de aŭtentika *peresperanta* politika laboro, kiu hodiaŭ serĉas paralelaĵon. Ne sen kialo

la laboristaj Esperanto-rondoj troviĝis sub polica observado.

Ĉiu paĝo de la libro ebligas flari la etoson de laborista movado kaj laborista medio, kiuj tiuepoke estis aŭtonoma kaj aparta sektoro de la socio. De ĝi restas hodiaŭ nur vestigoj. Sekve, ankaŭ la aŭtonoma laborista Esperanto-movado

estas – pro sociologiaj kialoj – fermita ĉapitro. Sed fermita ĉapitro ne estas la fino de la historio. Ĉu sekvos nova ĉapitro de maldekstra esperantismo, kun novaj roluloj kaj novaj enhavo, aŭ ĉu jam nur la nostalgia postparolo?

Gary Mickle

LETEROJ AL LA REDAKCIO



skribis Gilbert Lebec, FR-94370 Sucy-en-Brie (1997 11 05) pri «Neŭtrala' Esperanto-Kongreso» en *Magazino* 20:

Aparte interesis min ... la kritika artikolo, kiun Gerd Bussing verkis sub tiu titolo.

Mi mem ne ĉeestis tiun kongreson kaj ne povas juĝi, ĉu li troigas aŭ ne. Tamen, mi volonte taksas tiun raporton kiel objektivan.

Por malnova (kaj maljuna) aktivulo, kiel mi, ne estas agrable legi kritikojn kontraŭ sia «kara» SAT. Sed pravaj kritikoj ĉiam pli utilas ol afablaj laŭdoj.



Estas fakto, ke en SAT, kiel cetere, escepte de eta margeno, en la laborista movado ĝenerale, la klasbatalema kaj origineco de la ideoj iom malaperis. Certe, la evoluo de la vivkondiĉoj kaj, por SAT, la pliaĝiĝo de la membraro ludas rolon en tio.

Tamen, kiam dum kongreskunsido, la partoprenantoj ankoraŭ kapablas diskuti kaj disputi, tio signifas, ke ili ne estas tute apatiaj. La frakcioj de SAT ne kunvenas en «fermitaj» rondoj, ĉiu povas ilin ĉeesti, almenaŭ kiel observanto.

Estus bone, ke homo kiel Gerd Bussing membrigu al SAT kaj alportu iom da vigleco, kiun li ŝajne posedas.

Vi tute prave aperigis lian artikolon en *Magazino*, kiun mi cetere ĉiam plezure legas.

skribis Friedel Bues, DE-30419 Hannover (1997 10 31):

...En *Magazino* 20 estas indiko de I. Bociort pri lia eseo en *Magazino* 19. En ĝi li uzis la frazon en punkto ĉ: «...ĉiuj el la tendaroj, sed precipe la **socialisma**, malfavoris...» Ni estu atentemaj en la uzado de la vorto **socialismo** en niaj publikaĵoj...

Famaj virinoj en Berlino:

Roza Luksemburg

de Ludwig Heise

Roza Luksemburg naskiĝis la kvinan de marto 1871 en la ruse okupita parto de Polio. La knabino adoleskis en kulturita burĝa familio: la patrino ŝatis la germanan literaturon kaj la gepatroj estis amike ligitaj kun la jida verkisto Jicĥak Lejb Perc. Sed frue Roza perceptis, ke ŝi estis provizita per la plej fortaj malagrabloj: ŝi estis judino, ŝi lamis, la nazo estis tro granda kaj la tuta junulino tro malgranda, sed tiu malbelulino estis inteligenta, sincera kaj entuziasmiĝema. Ŝi vizitis liceon – kio tiutempe ne estis normala por knabinoj – sur la abiturienta atestilo ŝi havis la notojn «elstara» kaj «bon-ega», kaj oni atestis al ŝi «bonegan konduton», sed ŝi ne ricevis la «oran medalon», per kiu normale oni distingis tiajn bonegajn gelnantojn, kaŭze de «opozicia konduto kontraŭ aŭtoritatoj». Tiutempe ŝi jam konas sian Markson⁴, la tegmentisto Kasprzak enkondukis ŝin en la sekretan laboron de la sekreta socialista movado, kaj li helpis ŝin, kiam la organizo estis malkovrita de la polico kaj ŝi devis fuĝi el Polio.

⁴ Karlo Markso, 1818-1883, germana filozofo, aŭtoro de la historia materiismo, sur kiu baziĝis la socialistaj partioj de la 19a jarcento. Cefverko: *La kapitalo*.

Roza iris al Zuriko, kie troviĝis la sola eŭropa universitato, kiu akceptis studentinojn. La studenta vivo, la senfinaj diskutadoj de la polaj kaj rusaj elmigrantoj ne allogis ŝin. Ŝi jetis sin en la laboron, ekstudis matematikon, filozofion kaj aliajn fakojn, sed post la unuaj semestroj ŝi limiĝis sin je la ekonomio kaj la jurisprudenco (en 1898 ŝi doktoriĝos kun *summa cum laude*). Roza laboregis, kritikis (ankaŭ Markson!), mokis, amis kaj ĝuis la vivon.



En Zuriko, Roza konatiĝis kun Leo Jogihes. Leo devenis de bonstata juda familio en Vilno. Frue li apartenis al vilna grupo, kiu estis implikita en atenco kontraŭ la caro. Leo organizis majstre la fuĝon de siaj kamaradoj, sed malgraŭ tio, li ne estis ŝatata. Li estis problemplena viro, obstina kaj trudema, sed samtempe turmentata de memduboj; li konis nur la laboron kaj

la konspiron por la movado. Roza devis klopodi, klopodadi 15 jarojn por kapabligi lin al la amo, al la tenereco, kaj tiam ilia amrilato rompiĝis.

En Zuriko, en la ĉambro de Roza, kunvenis aro da gejunuloj, kiuj havis ĉiuj similajn politikajn spertojn – ĉiuj estis polaj intelektuloj, kiuj ne tiel senpere suferis de la kapitalismo kiel la laboristoj en la fabrikoj, sed ĉiuj kapablis analizi la situacion de la laborista

klaso. Ĉiuj estis marksistoj. Dum por la Pola Socialista Partio (PPS), kiu jam havis grandan influon sur la polaj laboristoj, la liberigo estis nacia pola afero, same kiel por la pola etburĝaro, la zurikaj gejunuloj opiniis kaj oponis, ke la laboristoj, polaj kaj rusaj, havas la samajn interesojn kaj la samajn opresantojn – la rusajn kaj polajn fabrikposedantojn. La zurikanoj eldonis propran gazeton por propagandi siajn ideojn: Roza estis la ĉefredaktorino. Do, la konflikto kun la PPS estis programita, kaj ĝi eksplodis ĉe la Internacia Socialista Kongreso en Zuriko en 1893.

Al tia kongreso ĉiuj socialistaj partioj sendis siajn delegitojn, sed ankaŭ la redakcio de la socialistaj gazetoj ricevis mandaton. Do, Roza volis partopreni la kongreson. Sed la delegitoj de la PPS kontestis la ĝustecon de la mandato. La plenkunveno devis decidi: Roza parolis.

La kongresprezidanto, la belgo Vanderveelde, raportis: «Mi vidas ŝin ankoraŭ. Ŝi ekrapidis el la rondo de la delegitoj, saltis sur iun seĝon por esti pli bone aŭdata. Etstatura, gracia en sia somera robo, kiu lerte kaŝetis ŝian korpodifekton, ŝi pledis por sia afero per entuziasmigaj vortoj, kun ensorĉantaj rigardoj, kaj la delegitaro levis la manojn por akcepti ŝin...»

La prezidanto eraris: mankis du voĉoj, kaj Roza devis forlasi la kongreson. Iu malbonhumora delegito moketis: «Roza – tio estas la histeria materiismo.»

Post la doktoriĝo, Roza volis transloĝiĝi al Germanio. Ĉu iu malŝate kuntiras la nazon? Ŝtato, al kiu ŝi apartenis pro sia deveno, ne ekzistis, nek pola nek juda ŝtato. Ŝi batalis ne por la liberigo de Polio, sed por la liberigo de la Internacia Proletaro – por Roza estis ĉiuj, kiuj ricevas salajron por la vendado de sia laboro, do ankaŭ ŝi, la juna doktorino; ankaŭ mi, la iama instruisto – kaj

pro tio ŝi povis batali pli bone en la granda kaj forta Socialista Partio (SPD)⁵, ol en la malgranda partio de polaj studentoj.

Sola problemo: kiel akiri la germanan ŝtatanecon, sen kiu ŝi ne povis politiki en Germanio. Nu, Roza ŝajnedziniĝis kun germana kamarado, kaj kiam ŝi estis germanino, ili divorcis. Sed restis alia problemo: Leo restis en Zuriko. Roza suferis pro la soleco: «Ĉu vi sentas, kiel mi amas vin?» ŝi skribis al Leo.

La 12an de majo 1898 Roza alvenis al Berlino, kaj tie ŝi prezentis sin en la partia centralo de la SPD. La funkciulo ne estis ravita de ŝi. Ŝi havis ĉion, kio iĝis ŝin maltaŭga por la politiko: ŝi estis virino, eksterlandano, ŝi lamis kaj ŝi kontraŭdiris. Dufoje ŝi kontraŭdiris al la viro, la funkciulo, kaj li devis koncedi, ke ŝi pravis! Oni sendis Rozan al Silezio. Tio estis la plej nigra [reakcia (red.)] parto de la germana imperio, kaj tie estis elektoj. Multaj laboristoj en tiu regiono komprenis nur la polan lingvon, kaj la funkciuloj de la SPD parolis nur la germanan. Roza havis brilan sukceson: la laboristoj komprenis ŝin kaj balotis por la socialista partio. Sed Roza revenis al Berlino elĉerpita, malsana.

Kiel aspektis tiu partio, en kiu Roza de nun laboris: estis socialista partio, kiu celis transdoni la ilojn de produktado al la socio, al la aro de la laboristoj.

⁵ SPD = Socialdemokrata Partio de Germanio, fondita en la jaro 1869 de Aŭgust Bebel kaj Wilhelm Liebknecht. En la unuaj jardekoj ĝi estis socialista, marksista partio, kiu celis transdoni la ilojn de produktado al la socio por plibonigi la komunajn vivkondiĉojn. Kiam la nombro de socialdemokratiaj parlamentanoj pligrandiĝis, kaj ĉefe post la morto de Bebel, la partio transformiĝis al reformpartio, kiu volis mildigi la misfunkciojn de la kapitalismo per sia influo en la parlamento, per la laboristaj sindikatoj kaj per entreprenkonsilioj.

Per revolucio? Tio ne certas, ĉar laŭ Markso la kapitalismo disrompiĝos pro siaj propraj antagonismoj. Sed en tiu SPD estis viro, kiu havis tute aliajn projektojn. Estas Eduardo Bernštajn: li postulis, ke la Socialdemokratio forlasu la ideojn de la klasbatalo kaj fariĝu «reformpartio», kiu akordiĝu kun la kapitalismo kaj moderigu ties mankojn per la influo de la laboristaj sindikatoj kaj de la parlamento. Roza ekkonis tuj la danĝerojn de tiuj ideoj, en la partia gazetaro ŝi furiozis kontraŭ ili per pasiaj artikoloj, tedis la kamaradojn (eĉ la partiestron Aŭgust Bebel) per sia aplombo, venkis ĉe du kongresoj ... kaj finfine ŝi mortis en la konflikto inter reformistoj kaj fidelaj socialistoj.

Roza estis ĉefredaktorino de pluraj socialdemokrataj gazetoj, kaj de 1907 ĝis la eksplodo de la milito ŝi estis docentino ĉe la partialternejo de la SPD. Jes, vi bone legas: alternejo de la socialista partio, por ties membroj. El subalternuloj, en kies kapoj, dum la infanaĝo, en la lernejo kaj poste en la armeo, oni estis enradikiginta la obeadon, el tiuj ĉiam obeantaj subalternuloj oni volis fari decidemajn, liberajn homojn, kapablajn por demokrataj decidoj.

Por Roza, «la diktaturo de la proletaro konsistas en la konsekvenca aplikado de la demokratio – ne en ĝia neniigo – en energiaj, rezolutaj intervenoj en la rajtojn kaj la ekonomian staton de la burĝa (t.e. la kapitalisma) socio, por realigi la socialisman revolucion ... la diktaturo de la proletaro efektiviĝos sur la publika forumo, kun la aktiva, nelimigita partopreno de la popolamasoj, en absoluta demokratio.»

Do la proleto devas lerni eĉ la fundamenton de sia situacio: la ekonomian teorion. Roza: «Ne estas pli kruda insulto, pli forta ofendo farita al la laboristaro, ol la aserto, ke la teorio taŭgas

nur por la diskutadoj de akademianoj.» Roza tradukis la verkon de Markso el la mistera faklingvo de filozofoj en la ĉiutagan germanan, sen fuŝi la filozofian esencon!! Estas mirindaĵo!!

Roza estis trifoje en germana mal-liberejo: pro ofendo de la imperiestro, pro malkaŝo de punbastonadoj en la germana armeo kaj pro sia pacifismo.

En aŭgusto 1907 okazis internacia socialista kongreso, kiu postulis, ke la laboristoj kaj ties reprezentantoj faru ĉion por eviti aŭ fini eventualan militon, eĉ neglektante naciajn ligojn. Sed en 1914, kiam la danĝero de tutmonda milito fariĝis pli kaj pli minacanta, la granda majstro de la socialdemokratio, Aŭgust Bebel, estis morta. La novaj partiestroj konformiĝis al la burĝaro, kaj dum en la ĉefurboj de Eŭropo, ankaŭ en Berlino, la laboristaro manifestaciis kontraŭ la milito, dum Jean Jaurès⁶ en pasiaj paroladoj alvokis la francojn al la paco, la germanaj partiestroj paktumis kun la imperiestra ĉefministro kaj la plejmulto de la socialdemokrataj parlamentanoj konsentis al la militkreditoj. Jean Jaurès estis murdita, Roza enkarcerigita, la internacia solidareco forgesita. Malamo kaj malamikeco triumfis.


En novembro 1918, kiam Roza povis forlasi la malliberejon, la revolucio jam estis farita. Kiam ŝi revenis al Berlino, la ĉefaj lokoj estis okupitaj de la «ruĝaj ŝipanoj», de ribelantaj soldatoj kaj berlinaj laboristoj. La soldatoj kaj la laboristoj estis elektintaj revoluciajn konsilianojn⁷.

⁶ Jean Jaurès, 1859-1914, franca politikisto, fondinto de la partio socialista franca kaj de la gazeto *Humonité*. Arda pacifisto, li estis murdita la antaŭtago de la mondmilito.

⁷ La konsilioj de la laboristoj estis elektitaj senpere el la grupo de la laboristoj, sen kontribuo de politikaj partioj. Ili povis ricevi direktivojn de la elektantoj kaj devis sin

lingva angulo

ĉi-foje: krucvortenigmo



horizontale

- 1: studobjekto de herpetologo
- 8: grekdevena pseŭdoprefikso
- 9: femaloj
- 10: persona pronomo
- 11: lumaperajo ĉirkaŭ astroj
- 12: prabovo
- 14: kvazaŭprefikso signifanta *vivrilata*
- 15: presa skribformo
- 18: mikrono
- 19: konjunkcio
- 20: speco de biero
- 22: kuracadis
- 25: lirika poemo
- 27: malsovaĝigi [rad.]
- 28: malgranda ŝarĝaŭto

vertikale

- 1: sanfavoreco
- 2: penetri
- 3: egipta diaĵo
- 4: grado de mistraso
- 5: montra pronomo
- 6: scienco pri nomoj
- 7: kava objekto, kiu entenas
- 13: japana religia movado
- 16: denove
- 17: reĝo de Itako
- 21: fondinto de Tebo [rad.]
- 23: ankoraŭfoja
- 24: furzi [neol.]
- 26: prepozicio

Sed la estroj de la SPD denove paktumas: ĉi-foje kun la supera armeestraro. Tiu ĉi sendas soldatojn al Berlino, la industriestroj dungas soldulojn por nuligi la atingajojn de la revolucio. Roza defendas ilin – ĉefe ŝi volas gardi la sistemon de la revoluciaj konsilioj. Sed la malgranda, malgrasiĝinta, grizhara virino tute ne similas al la revoluciulino sur la pentraĵo de Delacroix⁸, kiu, duonnuda, svingas la trikoloron. Roza skribas artikolojn por la *Ruĝa Flago*, parolas ĉe kunvenoj kaj fuĝas de unu loĝejo al la alia, ĉar ŝi scias, ke ŝia vivo estas minacata. La 15an de januaro ŝi estas kaptita. Oni kondukas ŝin al iu hotelo, kie oficiroj pridemandadas ŝin. Plurfoje oni bategas ŝin. Kiam ŝi forlasas la hotelon, la soldato Runge bategas ŝin dufoje per la kolbo de la karabeno sur la kapo, poste oni veturigas ŝin en la «Tiergarten» (granda parko en Berlino). Tie iu soldato premas sian revolveron kontraŭ ŝian kapon. «Ne pafu» estis ŝiaj lastaj vortoj. La kadavron ili jetas en berlinan kanalon.

Post la murdo la kulpuloj malaperis en aliaj taĉmentoj, kaŝitaj kaj helpitaj de siaj komplicoj. Finfine Leo Jogihes, fakte la edzo de Roza, malkovris iliajn kaŝejojn, denunciis ilin per gazetartikoloj kaj – estis murdita pro tio. Du murdistoj estis kondamnitaj al du jaroj de malliberejo – ne pro murdo, sed pro nepermesita uzo de armilo – kaj poste la nazioj rekompencis ilin.

pravigi antaŭ ili. Tiu sistemo naskiĝis en la Pariza Komunumo de 1871, kaj ĝi funkcias bone ĝis hodiaŭ en malgrandaj komunumoj, ekzemple en kibucoj. Ĉu ĝi povas funkcii en grandaj ŝtatoj, estas neverŝajne. En Sovetunio la sovetoj ne malebligis la diktaturon.

⁸ Eugène Delacroix, 1798-1883, fama franca pentristo, majstro de la romantika skolo en Francio.

„Kodo“ pri la laborrilatoj

En la Tradicio (Informo) de la Islamo, — en la Sunna kaj en la Hadisoj —; troviĝas sen-nombraj ekzemploj el la vivo ĉiutaga de la Profeto Muhammad kaj instruoj, kiujn oni povus kolekti en “kodon” pri la laborrilatoj, kaj tiu kodo donus sufiĉe da helpiloj, per kiuj ĉiuj bataloj inter dungantoj kaj dungitoj fariĝus tute superfluaĵ.

Raportis Abdullah filo de Umar:
La Sendito de Allah diris:
«Repagu al la laboristo lian laboron antaŭ ol sekiĝos lia ŝvito».

(Ibn Maĝa)

Raportis Abū-Zarr:
La Sendito de Allah diris:
«Allah metis viajn fratojn sub vian aŭtoritaton. Tiel, ĉiun ajn fraton, kiun Allah metis sub vian aŭtoritaton, vi nutru same, kiel vi nutras vin mem. Ne ŝarĝu lin per laboro pli peza, ol li povas toleri. Se vi tamen devas ŝarĝi lin per laboro, pli peza, ol li povas toleri, helpu lin je ĝi».

(Muslim)

Raportis Abū-Sa'jid Al-Ĥudri:
La profeto diris:
«Kiam iu persono dungas laboriston, li akordiĝu kun li pri la salajro».

(Ibn Maĝa)

La tri Tradicioj (Informoj) ĵus menciitaj esprimas tamen jam sufiĉe klare la tutan islaman filozofion pri tiu socia problemaro:

Estas substrekitaj la principoj, ke laboro kaj pago estas intime ligitaj, do la rekompenco pro plenumita tasko devas esti rapida kaj justa.

Ne rigardu dungiton, servanton, laboriston, kiel malsuperan estaĵon. Li havas la rajton manĝi kaj vesti sin kiel vi. La signifo, evidente, ne estas ĉi tie, ke oni devas malpermesi specialajn “uniformojn” por specialaj kvalitoj de laboro. La laboristo en la fabrikhalo ne povas havi la saman vestaĵon kiel lia dunganto en sia oficejo, li tamen devas havi la eblecon havigi al si decajn vestaĵojn kaj nutri sin sufiĉe kaj per bonaj manĝaĵoj;

ne estas permesite, se li laboras kaj donas al la socio sian energion sincere kaj laŭ sia povo, ke li estu vestita per ĉifonoj kaj manĝu la restaĵojn el la tablo de sia mastro, dum tiu ĉi vivas en lukso.

Kiel diris la filozofoj pri la bazaj necesoj de la homo, kiujn oni devas kontentigi se oni volas havi la kondiĉojn por lia paca ekzistado? “Victus et amictus” (manĝaĵoj kaj vestaĵoj)!

En la tria Informo ne estas precize klarigita la metodo de negocado kaj de interkonsento pri la ĝusta salajro, ĉu unuopa, ĉu per la helpo de sindikatoj laŭ la moderna modelo aŭ alie, sed la emfazo falas nemiskompreneble sur la vorton “akordiĝu”. Ĉu povas ankoraŭ ekzisti dubo, sub la lumo de la antaŭaj principoj, en kiu atmosfero oni devas akordiĝi? La dungito estas nomata, en la dua Informo, “frato” de la dunganto!

El la libro: “Je la Flanko de la Profeto”
de Italo Chiussi

K.H. Kersting



FIKCIA INTERVJUO

Ĉar MAGAZINO-redakcio tute ne trovis laboristan esperantiston por intervjui lin per kelkaj demandoj pri la valoro de laboristaj Esperanto-asocioj, ni petis nian redakcianon Ŝtefano aĝi kvazaŭ intervjuo okazis.

Ŝtefano (Ŝt): Saluton, kara samideano. Ĉu vi estas preta respondi al kelkaj demandoj pri la valoro de laboristaj Esperanto-asocioj?

Fikcia persono (fp): Kompreneble, sed bv. permesi, ke mi antaŭe demandas: Ĉu miaj respondoj aperos en iu bulteno?

Ŝt: Jes, en MAGAZINO, organo de la Libera Esperanto-Asocio. Ĉu vi konas ĉi tiun organizon? Ĝi ekzistas ek de la jaro 1956 kaj daŭrigas tradicie la laboristan Esperanto-movadon de antaŭ 1933.

fp: Mi aŭdis pri la asocio, sed mi ne povus prijuĝi ties indon ekzisti.

Ŝt: Ĉu vi estas membro de iu Esperantomovado, ĉu en Germanio, ĉu en eksterlando?

fp: Post la malekzisto de la iama GDR mi aliĝis kun la grupo el nia urbo, orienta Berlino, al GEA.

Ŝt: Vi do estis dum GDR-tempoj membro de l' tiea laborista Esperanto-Asocio. Ĉu vin ne interesas, ke samcela movado ekzistas en la Federacia Respubliko?

fp: Komprenu, Esperanto estas Esperanto, do estas laŭ mia opinio tute egale, kie oni membriĝas.

Ŝt: Ĉu vi trovas en GEA kondiĉojn, kiuj konformas al via vivkoncepto?

fp: Mi opinias, ke mia vivkoncepto ne gravas por esti membro en GEA.

Ŝt: Oni povas uzi Esperanton ankaŭ por kontaktoj en eksterlando por sperti la vivon tie — ĉu ne?

fp: Vi pravas, sed por mi ne estas grava, ĉu la eksterlanda esperantisto estas laboristo aŭ oficisto aŭ iu alia persono.

Ŝt: Ĉu ne estas tre taŭge, kiam la alia esperantisto havas la saman pensmanieron?

fp: En Berlino ekzistas vere aktiva grupo. En ĝi estas laŭ mia scio ankaŭ laboristoj. Kelkaj aliĝis al via asocio, sed intertempe bedaŭras, ke la Libera Esperanto-Asocio neniam varbas per argumentoj, ke ĝi estas Esperanto-asocio speciale por depende laborantaj homoj.

Ŝt: Vi eraras. Verŝajne vi aŭdis tonojn el la konservativa tendaro. LEA/G jam ĉiam akcentis sian tendencon, ĉu en la asocia organo, ĉu per informiloj. Kompreneble, ĉiu aktiveco dependas de la asociaj financoj. Dank' al grandanimaj solidaraĵ donacoj, i.a. de Scheffler, Weichmann, Bues, L. Puff+, von der Heid+, Bellen+, von Waldowski+ kaj multaj aliaj ni povis ĝis nun relative taŭge aktivi. Maljunaj kamaradoj de la 'unua horo' de LEA/G devis forlasi la asocion. Nur malgranda, intertempe pli aĝa teamo el la LEA/G-membraro restas kaj ne ĉesas aktivi en la intereso de la laborista Esperanto-movado kaj ties organizoj, i.a. S.A.T. Kaj; Feliĉe ni trovis junajn esperantistojn en Berlino, kiuj espereble daŭrigos la aktivecon. LEA/G estas partipolitike neŭtrala asocio. Strangaj ideologioj ne trovas lokon en nia asocio. LEA/G-anoj malakceptas diktaturojn kaj terorismojn. Ni laboras laŭ demokratiaj reguloj. Ni kunlaboras kun pacmovadoj i.a. TUTMONDE Pacifista Movado en Hispanio.

fp: Vi konvinkis min.

Ŝt: Mi ĝojas, ke nia interparolado havis pozitivan rezulton. Dankon.

AFS

*pli da novaĵoj sur
paĝoj 7 kaj 13!*

novaĵoj

Unua Renkontiĝo de Liberecanaj Esperanto- grupoj

Tiun ĉi renkontiĝon en Coll de Nargó partoprenis nur ses personoj, sed ili sukcesis definitive starigi reton surbaze de jam ekzistantaj kontaktoj. Ĝi nomiĝas Liberecana Esperanto-Reto Tutmonda (LERT) kaj estas provizore kunordigata de LEG en Tuluzo. La anoj planas eldoni *Liberecanan Informilon*, distribui kaj reeldoni liberecanajn verkojn, funkcii kiel informservo/gazetara agentejo inter esperantistaj kaj neesperantistaj liberecanaj organizaĵoj kaj agadi favore al Esperanto ĉe la Internacio de Anarkiistaj Federacioj (IAF), i.a. per lanĉo de plurlingva rezolucio okaze de ĝia kongreso okazonta en Liono (Francio). Informoj kaj abonilo por *LI* ĉe: LERT, ĉe Liberecana Esperanto-Grupo, p/a Canal Sud, 40 rue Alfred Duméril, FR-31400 Toulouse. Retpoŝte ĉe: canalsud@worldnet.fr

Magdeburga Folio

Lingve kaj presteknike altkvalita estas la *Magdeburga Folio*, kiun nia redakcio ekricevis interŝanĝe. La numero de 1998 02 enhavas detalan raporton pri la dum granda parto de la jarcento praktika infanŝtelado en Aŭstralio, per kiu la ŝtato forprenis al infanhejmoj aborigenajn infanojn por atingi ilian kulturan asimiliĝon. Kontakto D. Dungert, Olvenstedter Grund 25, DE-39130 Magdeburg.

Enhavo:

	<i>paĝo</i>
La <i>Magazino</i> kun nova formato (GM)	1
La politikeco de LEA/G (Sebastiano Hartviga)	3
Ni ne timas prezenti nian programon (AS)	4
Abrupte renversi la publicistikon de SAT kaj LEA/G ne eblas (GM)	5
NOVAĴOJ	7
Recenzo: <i>Vualo de l'silento</i>	8
Kian leganton celu la esperantistaj verkistoj? (Henri Castiaŭ)	8
Kio estas SAT? (K. H. Kersting)	9
lom da herezo (Henri Masson)	10
aldone al <i>Kio estas SAT?</i>	12
Disdonado de flugfolioj	13
NOVAĴOJ	13
Infanstriko (Ivar Lo Johansson [trad. F. Szilágyi])	14
Recenzo: <i>Zur Geschichte des deutschen Esperanto-Bundes in Leipzig (West Sachsen)</i> (GM)	16
LETEROJ AL LA REDAKCIO	17
Roza Luksemburg (Ludwig Heise)	18
LINGVA ANGULO	21
Kodo por la laborrilatoj (Italo Chiussi)	22
Fikcia Intervjuo (AS)	23
NOVAĴOJ	24